Arĝenta vojo: Ĉi tiu pilgrimvojo iras de Sevilla al Compostela tra Merida, Caceres, Salamanca, Zamora, Orense… Ĝin konstruis la romianoj antaŭ ĉirkaŭ 2000 jaroj. La maŭroj nomis ĝin **"Ruta Bal´latta",** kio signifas "larĝa pavimita vojo", sed la sono de tiu vorto komfuzigis la tiaman hispanajn aŭdintojn, tiel ke ili supozis ke la maŭroj diradis plata, kio en la hispana lingvo signifas arĝento.
Proksime al Zamora, konkrete en vilaĝeto Granja-de-Moreruela, la vojo dividiĝas kaj iu branĉo iras tra Puebla-de-Sanabria, Orense… al Compostela. Tiu dua branĉo de la Arĝenta vojo estas konata kiel **Sanabra vojo**.

Madrida vojo: Ekas en la hispana ĉefurbo mem kaj konkrete en la preĝejo dediĉita al la Apostolo Sankta Jakobo kaj la plej granda malfacilaĵo kiu havas la pilgrimantoj, estas la transiro de la montaro de Navacerrada. Ĝia itinero estas: Madrid, Colmenar-Viejo, Manzanares, Cercedilla, Segovia, Coca, Alcazarén, Simancas, Medina-de-Río-Seco, kaj en Sahagún konektas kun la Franca Vojo.

Ebra vojo: Ĝi komenciĝas en la Delto de la rivero Ebro, trairas la urbojn Tortosa, Gandesa, Caspe, Escatrón, Fuentes-de-Ebro, Zaragoza kaj kuniĝas en Logroño kun la Franca Vojo, aŭ pli ĝuste, oni devas diri ke ĉi tiu vojo kunfluas kun la Kataluna vojo en Fuentes-de-Ebro. Ĉi tiu vojo sekvas la kurson de la Ebro-rivero; ĝia pejzaĝo estas sufiĉe bela kvankam ne tiel varia kiel tiu de la Franca Vojo.

Orienta vojo: Nomiĝas ankaŭ "Valencia vojo". Ĝi komenciĝas en Valencia kaj ĝis la alveno al Kompostelo ĉi tiu irejo trairas kvin hispanajn komunumojn, pro kio la pilgrimantoj povas ĝui la diversecon de pejzaĝoj, kulturo, gastronomio..., sed grandparto el ĝia itinero estas komuna al aliaj vojoj kun kiuj ĝi kunfluas: Post pasi tra Mosqueruela, La Iglesuela del Cid, Cantavieja, Mirambel, Teruel... la Valencia vojo kuniĝas en Caspe kun la Vojo de la rivero Ebro.

Vojo de la Savanto: Temas pri tiu vojo iranta ekde Leon ĝis Oviedo. La origino de tiu nomo devenas de la granda kvanto da pilgrimanoj kiu dum mezepoko iradis ekde Leon-urbo, en la franca vojo, ĝis la Asturia ĉefurbo, por viziti la katedralon, nomata de San Salvador (Sankta Savanto) antaŭ daŭrigi la iradon al Kompostelo. Estas tre konata diraĵo kiu tekstas: Kiu iras al Santiago (Sankta Jakobo) kaj ne faras viziton al la **Salvador** (la Savanto) honoras la serviston sed ne la **Sinjoron.**

Angla vojo: Multaj eŭropaj pilgrimantoj alvenis al Galegio, precipe de tiuj nordaj lokoj perŝipe kiel la plej rapida kaj sekura vojo por pilgrimi al Kompostelo, pro tio, tiu vojo komencita en Coruña aŭ Ferrol (ambaŭ branĉoj kuniĝas en urbeto Carral) por poste daŭrigi ĝis Compostela, estas konata kiel angla vojo. Ĉar tiu-ĉi vojo komenciĝas en Galegio mem, ĝi estas la sufiĉe mallonga irejo: ĝi konsistas el nur tri etapoj: Ferrol, Miño kaj Sigüeiro.

Finistera vojo: Ĉi tiu irejo estas eĉ pli mallonga ol la antaŭa. Ankaŭ ĝi estas vojo kiu iras nur tra eta parto de la Galegia regiono. Finisterre, nomo kiu signifas "Ter-finaĵo", estas en la t. n. Marbordo de la morto. De tie ĝis Kompostelo estas nur 88 kilometroj. Multaj pilgrimantoj alvenintaj al Kompostelo, profitas la okazon por poste alproksimiĝi al la fama Finisterre (la loko kie la tero finiĝas), la plej malproksima okcidenta loko de la Ibera duoninsulo. Strange, tiu vojo, krom esti la plej mallonga el ĉiuj Jakobaj irejoj, ĝi ne iras al Kompostelo sed venas el Kompostelo por konduki al alia loko.

Lana vojo: Tiel nomata ĉar ĝi estis la vojo trairita de la hispanaj lano-tond-istoj, komenciĝanta en Alicante, kaj pasas tra Villena, Almansa, Alpera, Alatoz, Casas-Ibáñez, Campillo-de-Altobuey, Monteagudo-de-las-Salinas, Cuenca, Salmerón, Cifuentes, Atienza, Santo-Domingo-de-Silos kaj fine en Burgos kuniĝas kun la Franca Vojo.
Ŝajnas ke ĉi tiu estas la vojo en kiu la turismaj substrukturoj estas malplej disvolvigitaj, tamen la pejzaĝo estas same bela kaj alloga kiel tiu de aliaj branĉoj de la Jakoba Vojo.

Mozaraba vojo: Sub tiu nomo grupiĝas kelkaj vojoj kiuj, elirinte el Almería, Granada, Málaga kaj Córdoba, kuniĝas kun la Arĝenta vojo en Mérida. Ĉi tiu vojo estas sufiĉe misfama tial ke sekvis ĝin la araba armeestro Al-Manzor kiam li iris kun siaj trupoj al Kompostelo por disrabi tiun urbon.